

La fantoma pianistino

Rilate la domon, en kiu mi loĝas, mi amas multe da aferoj.

Mi amas ties lumon frumatene, kiam el la granda malantaŭa korto disvastiĝinte en la kuirejo, ĉi lastan ĝi igas brile helflava.

Mi amas ties bruojn. Bruas la centra hejtado, kiu ekfunkcias je la sesa. Murmuras la kameno, ĉar ventas. Ankaŭ mi amas alies bruojn.

La plej dolĉa estas la sono el la fantoma pianistino.

Softe ĝi venas de la ligna kaj gipsa plafono, ĝi trairas la brikajn kaj ŝtonajn septojn. Matene kaj eĉ posttagmeze, ofte dum longaj horoj.

Certe ŝi estas la junulino loĝanta ĉe la supra etaĝo, mi tion pensis, kiam unuafoje mi ĝin aŭdis kaj tion same mi diris al tiu. Ŝi malsupreniris la ŝtuparon dorse, singarde.

Ĉi estas konstruaĵo kun altaj etaĝoj kaj sen lifto. “Vi ludas tre bone”, mi diris al ŝi.

“Kun plezuro mi aŭskultas de vi”, mi aldiris. Turniĝinte ŝi min rigardis. “Mi ne kapablas ludi”, tiu diris al mi. “Nu mi neniel povas tion fari”, ŝi aldiris montrante sian piedon. Ĝi estis engipsigita. Mi ion balbutis enirante domen.

Estas eble, ke ŝi estas mia najbarino, mi pensis. Sendube ŝi estas tiu. Dank'al familinomo skribita sur la interfono mi konkludis, ke ŝi estas rusino kaj ŝia edzo, kiu ĉiam estas en blanka uniformo, laboras ĉe la Ŝipakademio.

Ĉio estas kohera, mi diris al mi mem. Li estas supera oficiro, ŝi estas rusa pianistino, ekzilita kaj malriĉa, kiu sin vivtenas donante privatajn lecionojn ĉe la domo.

Tiel staras la afero, mi diris al mi, sekve mi komencis subaŭskulti trans la komuna septo, kiel konfirmo de tio, tamen post nelonge miaj konkludoj malkonfirmitis.

Iuposttagmeze, kiam la pianistino ekludis, komence kelkajn notojn, poste pli kaj pli longe, tiam mi aŭdis la voĉon de la najbarino, kiu parolante durajn konsonantojn koleris kontraŭ sia edzo. Li jam forgesis preni la kuponojn de la lastaj aĉetoj, por ke iaj teleroj estu kolektitaj.

Subite mi ĉesis subaŭskulti kaj iris kujrejen. Rigardante tra la fenestro, mi vidis, ke du ĉirkaŭflugantaj laroj celis katon, kiu staris sur la tegmento de la ŝutrufabrika. Mi konstern-

iĝis. Tia klara ĉielo ŝajnis al mi tute senseca, ĉar mi ne konis la pianistinon ludantan tian sonon.

Tamen mi ne cedis. Mi refreŝigis miajn konojn pri akustiko kaj propagado de la sonoraj ondoj por fari novajn konkludojn.

Per metalaj plafonaj traboj, elegantaj kaj maldikaj, kiuj estas fiksitaj en subtenaj muroj, la sono propagiĝas de konstruaĵo al konstruaĵo.

Nu mi ekaŭskultis. Sidiĝinte sur fotelo ĉe la antaŭĉambro, tenante libron enmane mi streĉis la orelon. Tuj kiam mi aŭdis la unuajn notojn, mi rapide ekstaris por atingi lant-move, paŝo post paŝo, la trabizitan muron, sur kiu mi apogis la orelon.

Jes. La sono venis de la apuda konstruaĵo. Dank'al tiaj traboj la akustiko de la domo aliformiĝis, mi diris al mi mem irante supren-suben en la salono. Ĝi fariĝis fokuso de sonoj. Orelo de Dionizio. Mi mem fariĝis novDionizio. Kiel kompatema Dionizio, mi kredis, ke la muzikistino estas rusa ekzilitino, maljuna sinjorino, kiu instruas ludi pianon por vivteni sin mem, devigata vivi en modesta popola kvartalo post kiam ŝi ofte koncertis en la tuta mondo.

Nu mi ankoraŭfoje ŝin penis trovi kaj renkonti por tiun danki pro ŝia talento por muziko. Do mi komencis spioni la pordegon de la apuda konstruaĵo, sed post nelonge mi finis tion fari. Tro da personoj, malfacila entrepreno.

Tamen jaro post jaro mi ne ĉesis ĝui ŝian muzikarton. Ekde pli da dek jaroj ni jam loĝas en ĉi domo.

La fantoma pianistino ludas preskaŭ ĉiutage. Kelkfoje ŝi ne plu ludas dum tutaj semajnoj, sekve mi maltrankviliĝas pro tio kaj demandas min, ĉu ŝi bonfartas aŭ malsanas, ĉu ŝiaj parencoj tiun portis aliloken, ĉar ŝi estas tro malbonstata por vivi sola. Dum tiuj tagoj mankas al mi ŝia ekzerciĝado, ŝia diligenta praktikado de la muzikarto. La solfegado. La ludado de la notoj. Kiam ŝi ree ludas, tiam mi havas ĝojan koron.

Mi uzis la as-tempon, ĉar por mi la fantoma pianistino ĉiam ekzistas. Eĉ nun kiam, mi eksciis pri ŝia vera identeco. Tio okazis hazarde, same kiel multe da okazaĵoj havas lokon dum la tuta vivo. La pasintan semajnon mia najbarino loĝanta ĉe la malsupra etaĝo min vizitis. Mi malfermis la pordon, ŝi havis enmane pladon kun fiŝoj. "Mia frato ilin fiŝis hieraŭ nokte, ili estas skombroj", tiu diris al mi.

En tiu momento la fantoma pianistino komencis ludi Sonaton ĉe Lunklaro. “Aŭskultu”, mi diris al ŝi, sentante feliĉon partoprenigi ŝin en mia sekreto. “Tiu ludas Betovenon”, mi aldiris kaj mi ŝin sidigis en la salono. “Tiu estas mia frato”, ŝi al mi diris, mi enmane havis la pladon kun fiŝoj. “Li studis ĉe la konservatorio”, vi tion ne scias, ĉu?” Mi kapneis. “Se tio vin ĝenas, mi diros al li, ke li ĉesu ludi”, ŝi aldiris, embarasata pro mia silento. Denove mi kapneis. “La pasintan jaron li rompis al si fingron, sekve li ne plu ludas bone ol iam”, ŝi diris dum mi streĉis kompari la aspekton de ŝia frato-fiŝisto, kies saluto estas neafabla kaj sengracia, kun tiu de mia imaga pianistino. Nun mi scias, ke li estas la ludanto. Malgraŭ tio kiam matene vekiĝinte mi aŭdas la sonon de piano, mi ĉiam ekpensas pri ŝi. Pri mia fantoma pianistino. Mia kunulino dum multe da tagoj pasigataj en domo.

Veronica Galletta

Traduzione di Antonio Riccio